

34 MORTO DE BARONO GANDARA

„Aŭskultu," ekparolis poste sinjoro Menŝík, „tiun murdinton certe ili kaptis, tiuj policistoj en Liverpolo; tio estis metia krimo kaj tian ordinare oni malkovras. En tia kazo oni arestas ĉiujn notorajn kanajlojn, kiuj ankoraŭ libere moviĝas, kaj nun, ulo, diru, kian alibion ci havas. Kaj kiam li ne havas alibion, li estas sekve farinto. La polico ne ŝatas labori kun nekonataj faktoroj aŭ konstantoj; por esprimi min, la polico klopodas redukti ilin al konataj aŭ notoraj konstantoj. Kiam ili havas jam iun en la mano, ili mezuras lin, prenas liajn daktiloskopiaĵojn, kaj poste jam li estas ilia homo; ekde tiu tempo ili turnas sin al li kun konfido, tuj kiam ie io okazas; ili iras al li pro la malnova konatiĝo, same kiel oni iradas al sia malnova razisto aŭ en sian tabakvendejon. Malpli bone estas, se la krimon faris nefakulo aŭ novulo, ni diru vi aŭ mi; tiam estas por la polico multe pli malfacile pruvi lian kulpon.

En polica direkcio mi havas parencon, li nomiĝas konsilisto Pitr kaj estas onklo de mia edzino. Tiu sinjoro Pitr diras, se temas pri rabo, faris tion iu fakulo; kaj se ĝi estas murdo, faris tion plej versimile iu el la familio. Li havas tiajn stabilajn opiniojn, tiu sinjoro Pitr; ekzemple li asertas, ke malofte oni murdas fremdan homon, ĉar tio ne estas tiel facila; sed inter konatoj jam pli facile oni trovas okazon kaj en familio ĝi estas tute klara. Kiam oni taske donas al li malkovron de murdo, li penas informiĝi, kiu povis tion fari kun minimumaj malfacilaĵoj, kaj tion li sekvas. Sciu, Menŝík, li diradas, mi havas eĉ ne ereton da fantazio aŭ inĝenio; ĉe ni ĉiu konfirmos al vi, ke mi estas la plej granda imbecilo en la direkcio. Sciu, mi estas same primitiva kiel murdinto; kaj kion mi ekpensas, estas same ĉiutaga, ordinara kaj malsprita kiel liaj motivoj, plano kaj ago; kaj mi diras al vi, ke ĝuste tial plejparte ĉion mi solvas. Mi ne scias, ĉu iu el vi rememoras la murdon de tiu ekzota barono Gandara.

34 SMRT BARONA GANDARY

„Poslouchejte," děl na to pan Menŝík, „to oni toho vraha jistě chytli, ti poldové v Liverpoolu; to byl řemeslný zločin, a na takový se obyčejně přijde. V takovém pádě seberou všechny notorické lumpy, co zrovna běhají na svobodě, a teď, chlape, pověz, jaké máš alibi. A když nemá alibi, tak je to on. Ona policie nerada pracuje s neznámými činiteli nebo veličinami; abych tak řekl, hledí je uvést na známé čili notorické veličiny. Jak jednou někoho dostanou do rukou, tak si ho změří a vezmou mu daktylky, a pak už je to jejich člověk; od té doby se k němu s důvěrou obrazení, jakmile se něco šustne; jdou k němu ze staré známosti, jako člověk chodí k svému holiči nebo do své trafiky. Horší je, když se nějakého toho zločinu dopustí neodborník nebo nováček, řekněme vy nebo já; to už má policie těžší dostat se mu na kobytku.

Já mám na policejní direkci jednoho příbuzného, jmenuje se rada Pitr a je to strýc mé ženy. Tak ten pan Pitr říká, když je to loupež, tak to udělal nějaký odborník; a když je to vražda, tak to bude nejspíš někdo z rodiny. On má takové ustálené názory, ten pan Pitr; tak třeba on tvrdí, že člověk málokdy zavraždí cizího člověka, protože to není tak snadné; to už mezi známými se najde spíš příležitost, a v domácnosti je to rovnou na dlani. Když mu dají nějakou tu vraždu, tak on se hledí doptat, kdo to mohl udělat s nejmenšími obtížemi, a za tím jde. Víš, Menŝíku, říká, já ti nemám ždíbec fantazie nebo důvtipu; to ti každý u nás potvrdí, že jsem největší trouba na direkci. Víš, já jsem stejně primitivní jako ten vrah; a co mě napadne, je stejně všední, obyčejné a pitomé jako jeho pohnutky, plán a čin; a já ti řeknu, že právě tím na to většinou přijdu. Já nevím, pamatuje-li se kdo z vás na zavraždění toho cizokrajného barona Gandary.

Li estis ia mistera aventurulo, harojn li havis kiel frugilego kaj bela li estis kiel Lucifero; li loĝis en iu vilao apud Grébovka, kaj kio tie de temp' al tempo okazis, tio ne estas rakontebla.

Foje antaŭ mateniĝo oni aŭdis apud la vilao du revolver-pafojn, estis alarmo kaj poste oni trovis la baronon en la vilaa ĝardeno pafmortigita. Brust-paperujo mankis, sed alie nenia konsiderinda spuro tie restis; koncize, mistera unuaranga kazo.

Tiun murdon taske ricevis mia onklo Pitr, ĉar ĝuste nenion alian li havis; sed lia ĉefo anticipe tiel preterpase diras al li, sinjoro kolego, ĉi kazo ne estas laŭ via kutima stilo, sed penu montri, ke ankoraŭ vi ne estas matura por pensio. Onklo Pitr murmuris, ke li klopodos kaj foriris al la loko de l' kazo. Memkomprene, li trovis nenion, insultis detektivojn kaj iris sidigi sin al sia tablo, por bruligi sian gipspipon. Kiu vidus lin en tiu fetoranta fumo, opinius, ke sinjoro Pitr pripensas sian kazon, sed tio estus eraro; onklo Pitr tute ne pripensis, ĉar principe li rifuzadis la meditado. Murdanto ankaŭ ne meditas, ideo al li venas aŭ ne venas. La ceteraj en la direkcio bedaŭris onklon Pitr; tio ne estas kazo por li, ili diradis al si, domaĝe doni tiel belan temon al Pitr; Pitr taŭgas por maljunaj virinaĉoj, murditaj de ilia nevo aŭ svatanto de ilia servistino.

Iu kolego do, komisaro Mejzlík, iris kvazaŭ preterpase al onklo Pitr, sidiĝis sur la tablon kaj diris: Nu, sinjoro konsilisto, kio nova pri tiu Gandara? Eble li havas nevon, opiniis onklo Pitr. Sinjoro konsilisto, diris doktoro Mejzlík por helpi al li, „ĉi tio estos versimile iom alia kazo. Mi diras al vi, barono Gandara estis granda internacia spiono; kiu scias, pri kiaj strangaj aferoj ĉi tie temas - mi ne povas forgesi, ke perdiĝis lia Brust-paperujo. Sur via loko mi penus informiĝi -

Onklo Pitr kapskuis. Sinjoro kolego, li diris, ĉiu el ni havas siajn metodojn; unue oni devas konstati, ĉu ekzistas ĉi tie iuj parencoj, kiuj povus heredi post li.

To byl takový tajemný dobrodruh, vlasy měl jako havran a krásný byl jako Lucifer; on bydlel v jedné té vile u Grébovky, a co tam se časem dalo, to se nedá ani povídat.

Tož jednou k ránu bylo slyšet u té vily dvě rány z revolveru, byl nějaký poplach a pak našli toho barona v zahradě vily zastřeleného. Náprsní portfej měl pryč, ale jinak tam nezůstala žádná kloudná stopa; zkrátka záhadný případ prvního řádu.

Tedy tu vraždu dostal můj strýc Pitr, protože zrovna nic jiného neměl; ale jeho šéf mu předem tak mimochodem povídá, pane kolego, tenhle případ sic není ve vašem obyčejném stylu, ale hleďte ukázat, že ještě nejste zralý pro penzi. Strýc Pitr tedy zabručel, že bude hledět, a odebral se na místo činu. To se rozumí, nenašel nic, vynadal detektivům a šel si zase sednout k svému stolu, aby si zapálil svou gypsovku.

Kdo by ho viděl v tom smradlavém kouři, mýslil by si, že pan Pitr přemýšlí o svém případě, ale to by byla mejlka; strýc Pitr nepřemýšlel, protože zásadně zavrhoval přemýšlení. Vrah taky nepřemýšlí, říkal, toho to buď napadne, nebo nenapadne. Těm ostatním na direkci bylo strýce Pitra líto; to není případ pro něj, říkali si, škoda tak krásné látky pro Pitra; Pitr je na staré báby, které zabil jejich synovec nebo galán jejich služky.

Tož jeden kolega, komisař Mejzlík, zašel jako mimochodem k strýci Pitrovi, sedl si na stůl a povídá: Tak co, pane rado, co je nového s tím Gandarou? Třeba má nějakého synovce, mínil strýc Pitr. Pane rado, řekl ten doktor Mejzlík, aby mu pomohl, tohle asi bude trochu jiný případ. Já vám povím, baron Gandara byl velký mezinárodní špión; kdopak ví, o jaké divné věci tady poběží, – mně nejde z hlavy, že se mu ztratil portfej. Já bych se na vašem místě hleděl informovat – Strýc Pitr potřásl hlavou. Pane kolego, řekl, každý máme své metody; nejdřív se musí vyšetřit, nejsou-li tady nějakí příbuzní, kteří by po něm mohli dědit.

Due, diris doktoro Mejlík, estas al ni konate, ke baron Gandara estis ega hazardludanto; vi ne vizitadas societon, sinjoro konsilisto, vi ludas nur dominon en familio de Menšík, kaj ne havas tiajn rilatojn; se vi volas, mi demandas, kiu ludis kun li en la lastaj tagoj - sciu, ĉi tie povus temi pri tiel nomata honora ŝuldo -

Onklo Pitr morniĝis. Aŭdu, li diris, nenio por mi; neniam mi laboris en la pli altrangaj tavoloj, kaj en mia aĝo mi ne komencos kun ĉi tio. Lasu min trankvila kun la honora ŝuldo, tian kazon dum mia tuta vivo mi ne havis. Se tio ne estas familia murdo, ĝi estas do rabmurdo; kaj tiun devis fari iu el la domanoj. Tio ordinare okazas. Eblas, ke la kuiristino havas nevon.

Aŭ ŝoforo de Gandara, opiniis Mejlík, por kolerigi la onklon. Onklo Pitr kapneis. Ŝoforoj, li diris, tio dum mia tempo ne estis; mi ne memoras, ke ŝoforo farus rabmurdon. Ŝoforoj drinkas kaj ŝtelas benzinon; sed murdi, tion ankoraŭ mi ne havis. Junulo, Mejlík, mi restas ĉe miaj spertoj. Kiam vi estos tiom aĝa kiel mi -

Doktoro Mejlík estis kvazaŭ sur dornoj. Sinjoro konsilisto, li rapidis diri, ekzistas ankoraŭ la tria eblo. Barono Gandara rilatis al iu edziniĝinta sinjorino; hometo, la plej bela virino en Prago. Eble ĝi estas murdo pro ĵaluzo. Tio okazas, konsentis onklo Pitr. Tian murdon mi havis jam kvinfoje. Kaj kio estas la edzo de tiu sinjorino? Grandkomercisto, diras doktoro Mejlík. Ege grava firmao. Onklo Pitr enpeniĝis. Ĝi denove nenien kondukas, li diris. Ankoraŭ mi ne havis kazon, ke grandkomercisto iun pafmortigus. Trompojn, tion ili faras; sed murdojn pro ĵaluzo, tion oni faras en aliaj tavoloj. Ne, sinjoro kolego!

Sinjoro konsilisto, daŭrigis doktoro Mejlík, ĉu vi scias, per kio vivtenis sin tiu barono Gandara? Per ĉantaĝado. Li sciis terurajn aferojn pri - nu pri multaj ege riĉaj homoj. Estas atentinde, kiu povus havi intereson pri - hm, pri lia forigo. Nu sciu, diris post tio onklo Pitr, tian kazon jam unufoje mi havis, sed ni ne povis pruvi tion; el tio estis nura ridindigo.

Za druhé, povídal doktor Mejlík, je nám známo, že baron Gandara byl těžký hazardní hráč; vy nechodíte do společnosti, pane rado, vy jen hrajete u Menšíků domino a nemáte takové ty známosti; chcete-li, já se přeptám, kdo s ním v posledních dnech hrál, - víte, ono by tu mohlo jít o nějaký takzvaný čestný dluh -

Strýc Pitr se zasmušil. Poslouchejte, řekl, tohle není nic pro mne; já jsem nikdy nepracoval v těchhle vyšších vrstvách, a na stará kolena si s tím už nebudu začínat. Dejte mně pokoj s čestným dluhem, takový případ jsem jakživ neměl. Když to není rodinná vražda, tak to bude loupežná vražda; a tu musel udělat někdo z domácích lidí. To se tak obyčejně stává. Možná, že má kuchařka nějakého synovce.

Nebo Gandarův šofér, mínil ten Mejlík, aby strýce dopálil. Strýc Pitr zavrtěl hlavou. Šoféři, řekl, to za mých časů ještě nebylo; já se nepamatuju, že by šofér spáchal loupežnou vraždu. Šoféři chlastají a kradou benzín; ale aby vraždili, to jsem ještě neměl. Mládenče, Mejlíku, já se držím svých zkušeností. Až budete tak starý jako já - Doktor Mejlík byl jako na trní. Pane rado, řekl honem, je tu ještě třetí možnost. Baron Gandara měl poměr s jednou vdanou paní; panečku, nejkrásnější ženská v Praze. Třeba to je vražda ze žárlivosti. To se stává, souhlasil strýc Pitr. Takovou vraždu jsem už dělal pětkrát. A čím je manžel té paničky? Velkoobchodník, povídá pan Mejlík. Moc velká firma. Strýc Pitr se zamyslel. Tak to zas nikam nevede, řekl. Já jsem ještě neměl případ, že by velkoobchodník někoho zastřelil. Podvody, to oni dělají; ale vraždy ze žárlivosti, to se dělá v jiných vrstvách. Kdepak, pane kolego!

Pane rado, pokračoval doktor Mejlík, víte, čím se ten baron Gandara živil? Vydíráním. On vám věděl strašné věci o - no, o velké řadě moc bohatých lidí. To je na pováženou, kdo všechno by mohl mít zájem na - hm, na jeho odklizení. Tak vidíte, řekl na to strýc Pitr, takový případ jsem už jednou měl, ale nemohli jsme to dokázat; byla z toho jen holá ostuda.

Kion vi pensas, kun tia afero mi ne brulvundos miajn fingrojn la duan fojon. Al mi sufiĉas ordinara rabmurdo; mi ne ŝatas tiujn sensaciojn kaj misterajn skandalojn. Kiam mi havis vian aĝon, ankaŭ mi pensis, ke foje mi solvos ian gloran kriminalan kazon; tia jam estas la ambicio. Mia kara, laŭ la jaroj ĝi pasas; poste oni vidas, ke okazas nur ordinaraj kazoj.

Barono Gandara ne estis ordinara kazo, kontraŭis komisaro Mejzlík. Sinjoro, mi lin konis: eleganta trompisto, nigra kiel cigano - la plej bela kanajlo, kiun mi iam vidis. Mistera ulo. Démono. Falsludanto. Falsa barono. Aŭdu, tia homo ne mortas per ordinara maniero; nek per ordinara murdo. Ĉi tie temas pri io pli granda. Pri ege misteraj aferoj.

Tiuokaze ili ne donadu tion al mi, murmuris onklo Pitr mishumore. Mi ne havas la kapon por misteraj aferoj. Mi ignoras misterajn kazojn. Mi ŝatas ordinarajn kaj klarajn murdojn, kiel ekzemple murdon de tabakvendistino. Homo, mi jam ne lernos iajn novajn metodojn. Kiam ili donis tion al mi, mi faros tion laŭ la mia, kaj el tio estos ordinara rabmurdo. Se ili donus tion al vi, el tio estos kriminala sensacio, amromano aŭ politika krimo - Vi havas romantikan guston, Mejzlík; el la materialo vi farus mirindan kazon. Domaĝe, ke ili ne donis tion al vi.

Aŭskultu, hastvortigis doktoro Mejzlík, ĉu vi oponus, se mi - tute private... sekvus la aferon? Sciu, mi havas tiom da konatoj, kiuj scias diverson pri tiu Gandara - Memkomprene, miajn informojn mi disponigus al vi, aldonis Mejzlík rapide. Tio restus via kazo - nu?

Onklo Pitr incitite eksnufis. Respektan dankon, li diris, sed tio ne eblas. Sinjoro kolego, vi havas alian stilon ol mi; al vi rezultus el tio io tute alia ol al mi. Tio ne estas miksebla. Kion mi farus kun viaj spionoj, ludantoj, sinjorinoj kaj ĉia tia eminentularo? Kamarado, nenio el tio por mi. Se mi devas tion prilabori, el tio rezultos do tia mia ordinara fia kazo... Oni faras, kion oni scias.

Co vás nemá, s takovou věcí si už nebudu podruhé pálit prsty. Mně stačí obyčejná loupežná vražda; já nemám rád tyhle senzace a záhadné aféry. Když jsem byl ve vašem věku, tak jsem taky myslel, že jednou udělám nějaký slavný kriminální případ; to už je taková ctižádost. Holenku, s lety to člověka přejde; pak vidí, že se stávají jen obyčejné případy –

Baron Gandara nebyl obyčejný případ, namítal komisař Mejzlík. Pane, já ho znal: hochštapler, černý jako cikán – nejkrásnější lump, jakého jsem kdy viděl. Záhadný chlap. Démon. Falešný hráč. Falešný baron. Poslouchejte, takový člověk neumírá obyčejným způsobem; ani ne obyčejnou vraždou. Tady jde o něco víc. O moc záhadné věci.

Tak mi to nemají dávat, bručel strýc Pitr znechuceně. Já nemám hlavu na záhadné věci. Já se vykašlu na záhadné věci. Já mám rád obyčejné a jasné mordy, jako je vražda trafikantky. Člověče, já už se nebudu učit nějakým novým metodám. Když to dali mně, tak to udělám po svém a bude z toho obyčejná loupežná vražda. Kdyby to dali vám, tak z toho bude kriminální senzace, milostný román nebo politický zločin - Vy máte romantický vkus, Mejzlíku; vy byste z té látky zpracoval báječný případ. Škoda, že to nedali vám.

Poslouchejte, vyhrkl doktor Mejzlík, neměl byste námitky proti tomu, kdybych... docela privátně... za tou věcí šel? Víte, já mám tolik známých, kteří ledacos o tom Gandarovi vědí - Samozřejmě bych své informace dal k dispozici vám, dodával Mejzlík honem. Zůstal by to váš případ - tak co?

Strýc Pitr podrážděně zafrkal. Děkuju uctivě, řekl, ale to nejde. Pane kolego, vy máte jiný styl než já; vám by z toho vyšlo něco docela jiného nežli mně. To se nedá míchat. Co bych si já počal s vašimi špióny, hráči, paničkami a takovou tou honorací? Kamaráde, to není nic pro mne. Mám-li to zpracovat já, tak z toho vyjde takový ten můj všední a špinavý případ... Každý dělá, co umí.

En tiu momento iu frapis kaj eniris detektivo. Sinjoro konsilisto, li raportis, ni konstatis, ke la domservisto el la vilao de Gandara havas nevon. Li estas dudekjara bubo, senokupa, kaj loĝas en Vršovice numero 1451. Ofte li estis ĉe la domservisto. Kaj servistino de tie havas amanton, soldaton, sed tiu nun partoprenas ie manovrojn.

Estas bone, diris onklo Pitr. Iru rigardi al la nevo de la domservisto, faru traserĉon kaj alkonduktu lin ĉi tien.

Post du horoj havis onklo Pitr en la manoj monujon de Gandara, kiun ili trovis en lito de la junulo; nokte ili kaptis la bubon diboĉanta kaj matene li konfesis, ke li pafmortigis Gandara'n por rabi de li la brust-paperujon; estis en ĝi pli ol kvindek mil kronoj.

Nu vidu, Menšík, diris al mi poste onklo Pitr, ĝi estas la sama kazo kiel kun la maljuna virinaĉo el strato Křemencová; tiun ankaŭ mortigis nevo de domservisto. Sed, damne, knabo, se mi ekpensas, ke la kazon ricevus Mejzlík, kion li farus el ĉi temo! Sed por tio mi ne havas la fantazion, jen la vero.“

V tu chvíli zaklepal a vešel jeden detektiv. Pane rado, hlásil, tak jsme zjistili, že domovník z Gandarovy vily má synovce. Je to dvacetiletý kluk, bez zaměstnání, a bydlí ve Vršovicích číslo 1451. On často bejval u toho domovníka. A služka odtamtud má milého vojáka; ale ten je teď na manévrech.

Tak je dobře, řekl strýc Pitr. Běžte se podívat za tím domovníkovým synovcem, udělejte prohlídku a přiveďte ho sem.

Za dvě hodiny měl strýc Pitr v rukou Gandarovu tobolku, kterou našli v posteli toho mládence; v noci kluka chytli na flámu a ráno se přiznal, že Gandaru zastřelil, aby mu uloupil ten portfej; bylo v něm přes padesát tisíc korun.

Tak vidíš, Menšíku, řekl mně pak strýc Pitr, to je zrovna takový případ jako s tou starou bábou z Křemencové ulice; tu také zabil domovníkův synovec. Ale safra, hochu, když si pomyslím, že by ten případ dostal Mejzlík, co ten by z té látky udělal! Ale já na to nemám tu fantazii, to je to.“